FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto Bulteno

Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie
- N° 56 - - Novembro 1960 -

Redaktas M. HUET, 63 Boulevard François 1er, LE HAVRE (S. Mme).


## DORMEMULO, VEKIĜU !

Estas skribita ĉi-supre: "Redaktas M. HUET ..." . Kial ? Ĉar, pro profesiaj okupoj ĉiam kreskantaj, nia Samideano Gilbert MAMMAUX ne plu povas zorgi pri la Bulteno.

Ĉe tiu okazo, mi deziras diri al li, je via nomo, nian dankon por la laboro farita.

Kompreneble, mi estas nur ekstra redaktanto, ĉar estas nelaŭregule ke Prezidanto redaktas gazeton kies artikoloj rilatas al asocio de li estrata. Tial, de nun, vi devas pripensi la aferon. Kiu bonvolas plenumi la bultenistan postenon? Certe, tio ne estas honora sed labora posteno. Sed, tiu laboro malpeza ŝajnas kiam la bultenisto estas helpata de pluraj samideanoj, kiam li komprenas la utilon de la laboro farota. Ĉar vi ĉiuj deziras ke daŭru la ligilo inter ĉiuj Normandaj Esperantistoj, la Bulteno, mi ne dubas ke unu el vi decidos plenumi tiun postenon.

Antaŭ kelkaj tagoj, alparolante al novbakitaj geesperantistoj, mi diris: "... Mi ne scias ĉu vi estas Esperantistoj veraj, ĉar mi ne havas koraŭskultilon! Franco, kiu lernis la anglan lingvon ne estas, pro tio, Anglo! Same, lerni Esperanton ne sufiĉas por esti Esperantisto vera ... " Sed, mi ja scias ke VI estas Esperantistoj per la koro, veraj disĉiploj de la Majstro, ĉiam agantaj al alproksimiĝo de la homoj, de la koroj, trans landlimoj.

Nia Honor-Prezidanto Marcel BOSC estas, nature, optimista. Ofte, mi ne povas same opinii. Tamen, sciante ke pli ol 40 novaj Geesperantistoj aliĝis al l'Unuiĝo Normanda, ke fine la Suda parto de Normandujo vekiĝis, ke la laboristoj de automobilfabrikejo "Renault" en Cléon, kaj la Fervojistoj en ROUEN-SOTTEVILLE kreas kursojn kaj grupojn, tiam, mi ne povas esti maloptimista!

Sed, mi jam diris ke ni venkos nur se ni streĉos niajn fortojn por disvastigi la Movadon, se ni varbos novajn adeptojn. Ne estas tro malfrue! Kaj, ne diru: "Aliaj tion faros!"

NIA VENKO ESTOS ĈIES LABORO !

Vi certe konas tiun anekdoton: sur afiŝo, pri religia kunveno, oni povis legi: "Post prediko, ni kantos la himnon: Dormemulo, vekiĝu!" Nu, se post legado de mia artikolo vi estas emaj al dormo, ankaŭ mi diras al vi:

DORMEMULO, VEKIĜU !

Maurice HUET,
Prez. de UNE.

## NOUVELLES DE LA CAMPAGNE

### DE RECRUTEMENT

- Notre Campagne bat son plein!

- Pour le règlement, se reporter au n° 55 du Bulteno (Juillet 1960)

- A la date du 1er Novembre 1960, nous avons atteint le n° 541.

- Rappelons qu'il suffit, pour devenir Membre de U. E. N. (et par cela même pour participer au Concours) de verser la somme de 2 NFr (Membres actifs) ou 1 NFr (enfants, étudiants, militaires et économiquement faibles) au C. C. P.

ROUEN 283-40

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE
63 Boulevard François 1er - LE HAVRE

Merci aux Professeurs, Présidents, Secrétaires ou Trésoriers de Groupe qui voudront bien grouper les envois; dans ce cas, prière d'adresser une liste (nom et adresse complète des nouveaux Membres) à

S-ro A-E. LETENDRE , "Les Genêts", SAINT-LEURENT-DE-BREVEDENT (S.Mme)

---

## 30-a NORMANDA KONGRESO

LES ANDELYS — 6-an kaj 7-an de MAJO 1961

La nova Grupo pretigas zorge allogan programon kaj, kompreneble, bezonas helpon de ĉiuj por trafi la dezirindan sukceson. Jen la aliĝ-kondiĉoj:


| | ĝis la 28-2-61 | post la 1-3-61 |
|---|---|---|
| | 3 NFr | 4 NFr |
| Infanoj malpli ol 14-jaraj | senpage | senpage |
| Gejunuloj malpli ol 21-jaraj | 1, 50 NFr | 2 NFr |

Kasisto: D-ro P. BONNET, Bestkuracisto, 6 Boulevard Nehou, LES ANDELYS (Eure)
C.C.P. ROUEN 1.306-89
"Kiu donas akurate, tiu donas dufoje!"

Indiku samtempe ĉu vi bezonos dormoĉambron (kiom da personoj), ĉu vi partoprenos la bankedon. Mez-prezo: ĉambro 15 NFr, bankedo: 9 NFr.
N.B.- NUR la aliĝo estas pagota NUNE.

La venonta ekzemplero de nia Bulteno prezentos la definitivan detalan programon de la Kongreso.

S. N. C. F. & ESPERANTO



= Antaù gazetistaro kaj S.N.C.F.-estroj. Honorprezidanto BOSC alpinglas al la jako de fervojsito René LEPRETRE la ordenon Mérite Civique pro Esperanto-propagando.

(maldekstre: S-ro JOUIS, prez. Esp. Grupo en Rouen)

---

= Antaù tri jaroj estis revigliga ESPERANTO en la fervojista fako de ROUEN-SOTTEVILLE. Tiu renoviĝo estis farita dank'al la fervojista medio kiu ofte vojaĝigas siajn laboristojn de unu flanko al la alia.

Do, S-ro MARTIN, bone konata Esperantisto en la urbo Rennes devis labori, dum unu jaro, en Sotteville, kaj, tie, sen lia familio, loĝanta en malgranda ĉambro kaj disponigante de ĉiuj vesperoj, petis la permeson organizi Esperanto-kurson en fervojista kunvenejo, por propagandi Esperanton kaj, samtempe, distri sin.

La unuan jaron (1957-1958) dek gelernantoj sekvis la kursojn, la duan jaron, S-ro MARTIN, reforirinta en Rennes, unu el liaj lernantoj anstataùis lin kaj lernigis Esperanton al ses novaj personoj.

Intertempe, S-ro René LEPRETRE (alia nova Samideano), ĵus alveninta en Rouen, fondis Esp-Fervojistan Grupon de Rouen-Sotteville kiu apartenas al "FRANCA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO. (608 anojn).

Dum Majo 1959, la nova grupo invitis siajn kolegojn de Paris, LE Mans, Dieppe, Epernay, por viziti la normandan ĉefurbon. Dum 1960 la sama grupo kunvenigis siajn samlaboristojn en Dieppe, por viziti la havenon kaj la urbon. Tiu faka grupo ne estas ekstere de nia "Normanda Unuiĝo". Kore estas invititaj estas ĉiuj Gesamideanoj partopreni ĉiun fervojistan aranĝon. "ROUEN'a FERVOJISTA GRUPO" adreso: S-ro ROUSSIER, Gare SNCF ROUEN (Rive gauche).


= Dank'al la agado de la grupoj de Rouen kaj Sottevil-le malfermiĝis publika biblioteko ĉe Esperantista librovendisto, S-ro REMY, 47 rue d'Amiens, ROUEN. Telefono: 70-12.71. (Rabaton 10% al la gesamideanoj). Konstanta ekspozicio pri propagandiloj.

= Senpaga kurso por la Fervojistoj. Ĉiumerkrede je la 18-a. Salle des Conférences des Ateliers Buddicum, Sotteville-lès-Rouen.

---

Clichés gracieusement éxécutés par le Journal "LE HAVRE".

---



« Oui, j'ai compris : sans l'Esperanto on bute à chaque frontière »

# N I A  V I V O

ELBEUF-CLEON.- Le groupe espérantiste de la Régie Renault de Cléon va démarrer courant Novembre. Le Comité d'Etablissement de cette entreprise favorise notre mouvement au sein du groupement "Loisirs touristiques et Culturels".

Les cours, qui seront professés gratuitement aux membres du Personnel, seront prévus dès la mise sur pied des cours techniques de l'établissement, afin de permettre à un plus grand nombre de personnes d'apprendre la langue internationale.

Nous sommes heureux de signaler à nos amis que le premier bulletin de liaison entre les membres du Personnel, édité par le Comité d'Etablissement comportera un article sur l'Esperanto. Nous espérons que celui-ci décidera quelques nouveaux membres à venir se joindre à nous et à renforcer la grande famille internationale espérantiste.

LE HAVRE.- Tiun jaron, 3 kursoj funkcias en nia urbo. 19 gelernantoj sekvas la unuagradan kurson; gvidas S-ro HUET. La aliaj kursoj estas gvidataj de S-ro MAMMAUX kaj S-ino LAVALLEE.

La 6-an de Novembro okazis kunveno de la grupo. Post kiam Prezidanto HUET transdonis la diplomojn al la gelernantoj kiuj sukcesis la ekzamenojn lastan someron, S-ro MAMMAUX rakontis sian vojaĝon al kaj tra Jugoslavujo. 4 filmoj (2 de S-ro Mammaux kaj 2 de "Office de Tourisme Yougoslave) konkretigis tiun paroladon. 36 personoj partoprenis tiun sukceplenan kunvenon.

Edziniĝis nia bibliotekistino, F-ino Jacqueline VINCENT kun S-ro FAUVEL. Ni deziras feliĉon al la nova paro.

PETIT-QUEVILLY.- S-ro LOISEL estras kurson en fervojista metilernejo kun 54 gelernantoj.

S-ro GUERRE estras kurson por fervojistoj kun 8 lernantoj.

S-ro QUILLAUD estras 3 kursojn: a) en Junulgastejo, kun 14 gelernantoj, b) en lernejo kun 18 gelernantoj, c) perfektiga kurso kun 5 gelernantoj.

Pluraj propagandvesperoj estis organizataj en Junuldomo, en Junulgastejo, en Metilernejo. Multaj flugfolioj estis disdonataj. Kelkaj artikoloj kaj multaj komunikoj aperis en "Paris-Normandie".

Multe kontribuis al tia sukceso la viglaj aktivuloj de la Sottevilla grupo, S-roj LOISEL kaj GUERRE.

VIRE.- Funkcias 2 kursoj, gvidataj de S-roj SAPERAS kaj LEGRET. La loka grupo ricevas apogon kaj helpon de la tiea laika amikaro. Tiu asocio pagis la vojaĝon de la gelernantoj al Domfront'a Kongreso, kaj, ankaŭ, premi-librojn.

La estraro de la grupo ricevis la promeson ke, venontan jaron, la faldfolioj de la Turisma Asocio de Vire enhavas esperantlingvan tekston.

ROUEN.- Ĉiuvendrede, je 19 h., publika kurso, 161 rue Beauvoisine. Kursgvidanto: S-ro QUILLAUD. Ĉiumerkrede, je 19 h. 30, kurso por la Junularo en "Auberge de la Jeunesse, 17 rue Diderot (rive gauche).

Ampleksa propagando en Turisma-fako. 1 000 invitiloj senditaj tra tuta Eŭropo, petante la eksterlandanojn ke ili venu amase de la printempo en nia regiono. Ŝtatservoj kaj Turismoficejoj aplaŭdas tiun decidon.

FECAMP.- La vigla grupo denove bataladas sub direkto de nia Amiko PERMANNE. Grava propagando en la gazetoj kaj per afiŝoj. Publika parolado. Unuagrada kurso gvidata de F-ino JILLET, duagrada, de S-ro PERMANNE.

AUMALE.- Propagando de S-ro TRUFFART, apotekisto.
18-an de Novembro: publika parolado de S-ro BOSC, sub patrono de l'Unuiĝo Normanda kaj "Comité linguistique et culturel" de Strasbourg. Gazetaro abunde raportas pri tiu inform-kunveno.

DOMFRONT.- Pro la efiko de la Domfronta Kongreso, la grupo planas la organizadon de INTERNACIA DISTRO-SEMAJNO, okazonta tuj POST la Universala Kongreso 1961.
La celo: konatigi al la eksterlandanoj esperantistaj la vivon en Normandujo.
Unu deziro: francaj gesamideanoj rendevuu en Domfront kun siaj gekorespondantoj: ĉiu grupo loĝos en la sama hotelo sed, ĉiuj grupoj partoprenos la komunajn aranĝojn kaj, ĉiutage, la partoprenantoj tagmanĝos kune, en la sama hotelo.

Eroj de la programo: Vizitoj de farmobienoj, kasteloj, detala vizito de Domfront, prelegoj pri famuloj, k.t.p. ...

Nia Samideano VERON, place Petite Bruyère, insiste petas la partoprenon de la Normandaj Gesamideanoj.

= Tri publikaj kursoj. Gvidanto: S-ro Véron (23 gelernantoj).

= Priparolado ĉe "Rotary Klubo".

Nepre necesas ke ni respondu amase al la grandskala organizo de Domfronta Grupo. Skribu hodiaŭ al viaj korespondantoj.

CAEN.- Vigla propagando de la tiea grupo, prezidata de F-ino CHERIE.
Senlacaj klopodoj kaj kursoj de nia Samideano MARTIN.
19 Gelernantoj en publika kurso kaj kreo de kurso en Office Municipal de la Jeunesse. Taŭga propagando en "Ecole Normale".

LES ANDELYS.- Ĝenerala kunsido de la grupo la 12-an de Oktobro (20 partoprenantoj)sub honorprezidanteco de F-ino VINCENT, lernejestrino. Tagordo: Raporto pri la vojaĝo al Bruselo de la kurs-sukcesintinoj kaj pretigo pri Normanda Kongreso. Sylvie BONNET (12 jara) kaj Josette CARON (11 jara) kiuj gajnis la senpagan vojaĝon al Bruselo prezentis siajn memoraĵojn pri Belgujo.

---

## E K Z A M E N O J

Sukcesis la ekzamenojn, kiuj okazis lastan Someron, kaj meritis la atestojn pri:

LERNADO: F-ino BANSARD, S-ro CHAUMEIL, S-ino MAMMAUX, S-ro MIGNOT, S-ro SAULOT.

KAPABLECO: S-ino COLLEU, S-ro PERMANNE.

PEDAGOGIO: S-ino LAVALLEE.

Niajn korajn gratulojn!

---

## DEZIRAS KORESPONDI PRI FILATELO:

S-ro G. SCHLEPPE, P. ta TAMOW-OPOLSKI , Naklo n$^r$ 66 - POLLANDO.